

# BULGARA ESPERANTISTO

TEKNIKA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Jarabono: 10 bulgaraj levoj,  
0.50 sv. fr. aŭ egalvaloro  
Adreso: Sofio, Poŝtkesto 233

Anoncoj: 2 levoj je kvadrata  
cm. Anoncetoj: 1 levo je  
vorto aŭ mallongigo.

## NOVA PAŜO

Ke Esperanto ĝuas sufiĉan popularecon ĉe la bulgara socio — pri tio neniu dubas. Ke la nombro de la internacilingvanoj bonege kreskas de tago al tago — estas videble. Ke ni, la esperantistoj, jam kreis konsiderindan movadon — estas sendube. Sed ke ni estas bone organizitaj — oni rajte dubas. Kaj ke ni ĝis nun pleje akceladis la kvanton — al tio neniu kontraŭdiros.

Ni konfesu: jam svarmas ĉe ni la esperantistoj — Bulgarujo estas unu el la malmultaj landoj, kie en ĉiu urbo kaj eĉ en ĉiu pli granda vilaĝo troveblas verdstelanoj. Kaj tio iluziigas — kvazaŭ baldaŭ sonoros la horo por la fina venko de Esperanto. Ve, nura iluzio...

Kvante ni svarmas, sed kvalite ni estas for de l' ideala stato. La plimulto kontentiĝas per elementaj lingvokonoj — ĝia lingva nivelo estas tre malalta. Multaj ankoraŭ baraktas en la lingvo. La „perfektuloj“ perfingre nombreblas. La bonaj, la taŭgaj kursgvidantoj, kiuj ne nur ek- sed finverdigas, estas maloftaj. Ni ne estas ankoraŭ pretaj pri eventuala enkonduko de Esperanto en la lernejojn — kie estas niaj pedagogoj? Kaj demandoj la demandon sekvas. Ili estas multaj. Kaj tio pensigas — ĝi montras al ni gravajn mankojn en nia movado, ĝi vidigas al ni nefinlaboritan grundon.

Kaj respondi al la novaj postuloj, al la novaj bezonoj en nia movado — jen la ĉefa tasko de la ĵusfondita Bulgara Esperanto-Instituto. Ĝi markas la sulkon, kiu nin dividas de la malnovo, kun ĝia naiva kredo, ke la nura bruemo alportos al ni la venkon kaj — la novo, kun la firma konscio, ke la kvalita flanko en ĉiu movado estas la decidiga antaŭkondiĉo por la atingo de l' celata idealo. Ke la silenta kaj serioza laboro piej certe venigos la venkon.

Kaj ni esperas, ke nia nova institucio — la Bulgara Esperanto-Instituto — ludos bonegan, akceligan rolon en nia movado.

Kun tiu espero ni nin gratulu okaze de ĝia fondo!

T. K. P.

BULGARA ESPERANTO-INSTITUTO  
estas jam fondita. Ĝia estraro konsistas el:

Direktoro — D-ro Zah. Zahariev;  
Sekretario-kasisto — Teodor K. Popoff;  
Prezidanto de la Ekzamena Komitato — At. D. Atanasov — Ada; Prez. de la Vortara Komitato — Sim. St. Hesapĉiev;  
Prez. de la Historia Kom. — St. Masseuroff;  
Prez. de la Recenza Kom. — Emil Stratev;  
Prez. de la Bibliografia Kom. — Staljan Daniskov.



## STATUTO

### de Bulgara Esperanto-Instituto - BEI.

§ 1. Estas fondata Bulgara Esperanto-Instituto ĉe la Bulgara Esperantista Asocio kun sidejo en Sofia. La Instituto estas tute sendependa en siaj decidoj kaj funkcioj, kiuj koncernas demandojn el ĝia kompetenteco.

#### CELO

§ 2. Kiel supera prilingva institucio, en la bulgara esperantomovado, la Instituto ĝenerale celas esti scienca helpanto de BEA por efektiviĝi la celon de BEA

#### RIMEDOJ

§ 3. La Instituto ĉerpas finanĉrimedojn el: subvencioj, donacoj, ekzamen- kaj recenz-taksoj k. a.

Ĉiu sumo estas elspezata nur laŭ decido de la BEI-estraro;

#### KONSISTO

§ 4. La Instituto konsistas el kvin komitatoj:

- 1) Ekzamena komitato,
- 2) Vortara                    "
- 3) Historia                   "
- 4) Recenza                   "
- 5) Bibliografia             "

#### DIREKTADO

§ 5. La Instituto estas direktata de unu direktoro, kiu estas elektata de la CK de BEA.

§ 6. Ĉiu komitato estas gvidata de unu prezidanto montrita de la direktoro kaj oficigita de la CK de BEA.

§ 7. Ĉiu komitato konsistas el membroj elektitaj de la estraro de la Instituto. La nombro

de la membroj ne estas limigita. La membroj povas loĝi ankaŭ en la provinco.

*Rimarko.* Unu persono povas esti samtempe membro de kelkaj komitatoj.

§ 8. La kurantaj laboroj de la Instituto estas plenumataj de unu sekretario-kasisto montrita de la estraro de BEI kaj oficigita de la CK de BEA. La ofico de la sekretario povas esti pagata se la kondiĉoj permesas tion.

§ 9. La direktoro, la sekretario kaj la kvin prezidantoj formas la estraron de la Instituto kaj ĝi kunsidas kiam la direktoro trovas tion necesa.

§ 10. La direktoro kaj la prezidantoj estas elektataj por kvin jaroj.

§ 11. Se iu el la institutanoj per siaj agoj malhelpas aŭ kompromitas la Esper. movadon, li estas forigata el sia posteno laŭ decido de la estraro de BEI kun aprobo de CK de BEA.

§ 12. Ĉe la Instituto estas fondata biblioteko, kiu povas esti uzata de la institutanoj kaj de privataj personoj, post permeso de la direktoro.

§ 13. Je la fino de ĉiu asocia jaro, unu monaton antaŭ la kongreso de BEA, la prezidantoj skribas jarajn raportojn pri la agado de la respektivaj komitatoj kaj transdonas ilin al la direktoro. La lasta preparas la ĝeneralan raporton de la Instituto kaj prezentas ĝin per la CK al la kongreso.

*Rimarko.* La financa kaj administra parto de la raporto estas kon-



trolata de la Kontrola komitato de BEA.

### EKZAMENA KOMITATO—E. K.

§ 14. La Ekzamena Komitato konsistas minimume el 2 membroj loĝantaj en Sofio. La ceteraj povas loĝi en la provinco.

§ 15. La celo de la EK estas duobla: a) organizi la laboron por preparo de la plej taŭgaj metodoj por instruado de Esperanto al infanoj, laboristoj, kleruloj k. a.; b) fari ekzamenojn por scipovo de Esperanto kaj por instrukapablo.

§ 16. Por plenumo de la celo la prezidanto de la EK preparas specialan planon, aprobotan de la estraro de BEI.

§ 17. La ekzamenoj okazas ĉefe dum la kongresoj de BEA kaj eventuale dum la Kristnaska kaj Paska ferioj kaj regionaj konferencoj se minimume 2 kandidatoj aperas.

Rimarko. Ekzamenoj povas okazi en Sofio ĉiutempe post interkonsento flanke de la kandidatoj kun BEI.

§ 18. La ekzamenoj estas regulaj, se minimume du ekzamenantoj ĉeestas.

§ 19. La ekzamenoj estas farataj laŭ la programo de la Internacia Instituto de Esperanto, aldonita ĉi-sube.

§ 20. La prezidanto de EK publicas en la asocia organo, ĉiujare, en la komenco de la asocia jaro, la programon de la ekzamenoj kaj la literaturon laŭ kiu devas prepari sin la ekzamenkandidatoj.

§ 21. Ĉiu ekzamenkandidato direktas petskribon kun la difinita takso, per la direktoro de BEI, al la prezidanto de la EK,

almenaŭ 10 tagojn antaŭ la ekzameno.

§ 22. La ekzamenoj estas tri-specaj: I. *por elementaj konoj de Esperanto*; II. *por scipovo de la lingvo*; III. *por instrukapablo*.

§ 23. Por la unua ekzameno oni pagas 50 levojn, por la dua — 100 levojn, por la tria — 200 levojn.

§ 24. La duono de la taksoj estas donata al la ekzamenantoj — la cetera duono restas por la Instituto.

§ 25. Al la ekzamenintoj la Instituto donas diplomojn subskribitajn de la direktoro, la sekretario kaj la ekzamenintoj.

### Programo de la ekzamenoj (§ 19)

#### I. Ekzameno (pri elementaj konoj)

1. Unupaĝa letero je temo el la ĉiutaga vivo;

2. Unupaĝa priskribo aŭ rakonto je temo el la esperanta movado;

Ordinara interparolo en Esperanto — demandoj kaj respondoj je facilaj temoj:

4. Analizo de teksto.

#### II. Ekzameno (pri scipovo de la lingvo)

1. Unupaĝa letero je temo el la ĉiutaga vivo;

2. Unupaĝa verkaĵo pri la esp. vivo (historio, organizo, praktika apliko);

3. Mallonga interparolo en Esperanto je facilaj temoj;

4. Analizo de tekstoj. Demandoj el la gramatiko.

#### III. Ekzameno (pri instrukapablo)

1. Verkaĵo je temo el la Esperanta vivo:



2. Verkaĵo pri la instruado, pri la lingvo aŭ pri la literaturo;

3. Legado kaj analizo de teksto, gramatikaj demandoj, interparoloj pri la maniero de instruado de Esperanto;

4. Esperanto-leciono — klarigo de gramatikaj kaj stilaj demandoj;

5. Demandoj pri la historio de Esperanto, pri la esp. organizaĵoj kaj pri la lingvo mem.

Rimarko. La II kaj III ekzamenoj estas farataj nur en Esperanto.

#### VORTARA KOMITATO — V. K.

§ 26. La ĉefa celo de la Vortara Komitato estas kolekti materialon kaj aranĝi la organizon por kreo de plenaj bulg.-esp. kaj esp.-bulgara vortaroj.

§ 27. Unu membro de la Komitato estas elektita kiel ĝia sekretario. La lasta respondas al skribaj demandoj pri nekonataj vortoj kaj esprimoj. Se la respondotaĵo estas de komuna intereso, oni presigas laŭeble la demandojn kaj la respondojn en la asocia organo.

§ 28. La Komitato zorgas trovi taŭgajn tradukojn de specialaj bulgaraj vortoj kaj esprimoj kaj presigas ilin laŭeble en la asocia organo.

§ 29. La komitato kontrolas kaj aprobas manuskriptojn de vortaroj, preparitaj por eldono. La takso pri tio estas definata de la estraro kaj uzata laŭ § 24.

#### HISTORIA KOMITATO — H. K.

§ 30. La ĉefa celo de la Historia Komitato estas kolekti materialon pri la historio de la Esperanto-movado en nia lando kaj organizi la laboron pri verko de tia.

§ 31. Por plenumi sian celon, la komitatanoj preparas specialan planon de agado: demandoj, intervjuoj, kun malnovaj esperantistoj, traserĉo de arkivoj, bibliotekoj k. a.

#### RECENZA KOMITATO — R. K.

§ 32. La Recenza Komitato recenzas manuskriptojn de presotaj libroj kaj mal- aŭ aprobas ilin.

§ 33. La manuskriptoj legeble skribitaj kaj la libroj, kiuj estos recenzataj de la R. K. devas esti sendataj al la BEI en du ekzempleroj.

§ 34. Oni pagas 50 levojn por unu presfolio de la recenzota manuskripta verko kaj 30 levojn de presita libro.

Rimarko. La pagata mono estas uzata laŭ § 24. Unu el la du ekzempleroj restas por la recenzanto kaj la cetera por BEI.

§ 35. La prezidanto de RK difinas templimon por la recenzo kaj sciigas ĝin al la aŭtoro skribe.

§ 36. La recenzanto raportas skribe al la prezidanto pri la farita laboro. La skribita recenzo povas esti publikigita en la asocia organo.

#### BIBLIOGRAFIA KOMITATO—BK

§ 37. La ĉefa celo de la Bibliografia Komitato estas kolekti materialon por verki plenan bibliografion de la ĝis nun aperintaj eldonaĵoj en Bulgario, en kaj pri Esperanto.

§ 38. La BK preparas specialan planon de laboro kaj rajtas komisii al ne membroj ke ili laboru por la suprenomita tasko.

§ 39. La BEI havas rondforman stampilon kun ĉirkaŭskribo „Bulgara Esperanto-Instituto —



Sofia“ kaj en la mezo — kvinpinta stelo.

§ 40. En okazo de likvido de BEI ĝia havaĵo estas transdonata al la Bulgara Esperantista Asocio.

— —  
La jena statuto estas akceptita de la Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Asocio la 17-an de decembro 1930 — Sofia.

## Enlanda movado

De pluraj lokoj en nia lando ni ricevas detalajn sciigojn pri vigla poresperanta laboro. Sed, ĉar la amplekso de nia organo estas tre limigita, ni povas nur koncize kroniki ilin ĉi-tie.

— Sofia. Okaze de la „Verda Semajno“, la loka societo aranĝis la 7-an de decembro j. k. en aŭditorio 5 de la Libera Universitato kunvenon en kiu paroladis: s-ro G. Aktarĝiev — prezidanto de BEA — je temo „La problemo pri internacia lingvo“, s-ro At. D. Atanasov — Ada pri la apliko de Esperanto kaj s-ro D-ro Zah. Zahariev pri Esperanto en la scienco. La kunveno estis bone vizitita.

— La 11-an de la sama monato la Sofiaj geesperantistoj aranĝis intiman amuzvesperon en la legejo „Hristo Botev“. Per gramofondiskoj oni aŭdis paroladojn de Zamenhof, Privat kaj Cart.

— La 15-an de la sama monato, okaze de la naŝkiĝtago de Zamenhof kaj la tago de la libro, aranĝita amuzvespero kun parolado de s-ro D-ro Zah. Zahariev pri Zamenhof kaj la libro. La ĥoro de la Sporta Turista Klubo „Esperanto“ i. a. kantis la belan kanton „Brilas la verda stel“.

— S-ano Evlogi Zahariev, studento, je la nomo de la Junula Abstinula Societo „Ustrem“, gvidas kurson por komencantoj en la supra salono de la Vegetara restoracio „Trezvenost“.

— La 19-an de decembro j. k. ekfunkciis novaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj en la legejo

„Hristo Botev“. Kursgvidanto: D-ro Zah. Zahariev.

— En № 2167 de la 20. X. j. k. de la esperanta en Sofio franclingva ĵurnalo „La Bulgarie“, aperis artikolo „Espéranto et la paix“ (Esperanto kaj la paco“) de nia samideanino f-ino S. Nedelĉeva.

— En № 92 de 6. XII. j. k. de la semajna ĵurnalo „Literaturen glas“ aperis artikolo „Tolstoj kaj Esperanto“ publicita de s-ano Petro Dinekov.

Plovdiv. Nove elektita estraro de la loka societo „Kulturo“: prezidanto — Hristo Ĉervenkov, sekretario — Ivan Ŝivarov, kasisto — Sr. Petrov, bibliotekisto — Benci Behar. En lernantaj rondoj agas s-ro Ivan H. Krestanov — instruisto en la loka komerca gimnazio.

Stara-Zagora. Nova estraro de la loka societo „Verdstelano“: prezidanto — Todor Gospodinov, sekretario — Nikolaj Vasilkov, kasisto — Ilia Zafirov. Kurso malfermita la 9. XI. j. k. Kursgvidanto: Nik. Vasilkov. La 30-an de la sama monato ekfunkciis nova kurso por la adeptoj de la „Blanka Frataro“.

La regiona ĵurnalo „Zemja“ regule aperigas priesperantajn artikolojn.

— Ŝumen. Je la 15. X. j. k. la societo „Probuda“ malfermis kurson por geurbanoj kaj gestudentoj de la Supera Instruista Instituto. Kursgvidanto: s-ro Ivan Garvanov.

— Ruse. La loka societo „Solidareco“ vige laboras. Ĝi okazigis a



„Verda Semajno“-n je la 20—27-a de novembro j. k., bone antaŭpreparita per gazetaj artikoloj en „Rusenska Poŝta“, „Tribuna“ kaj „Novini“. La 30-an de novembro malfermita kurso por geurbanoj. Kursgvidanto: s-ro Dim. Ivanov.

Baldaŭ malfermotaj kursoj en la profesia lernejo kaj por geknaboj.

La 15-an de decembro j. k. intima amuzvespero en la lernejo „A. H. Oglu“.

— **Varna**. Estraro de la loka societo „Albatro“: prezidanto—Nikola Ĉehlarov, sekr.-kasisto — Karl Niemetz, kasisto — Dim. Kostov, bibliotekisto — Georgi Nikolov. Kursoj baldaŭ malfermotaj.

— **Bjala**. Estraro de la loka esp. societo: prezidanto — Asen Pennev, vicprezidanto — Sava Altimirski, sekretario-kasisto — Sim. Baltaĝiev. Ekde 12. X. j. k. kurson gvidas s-ro Sim. Baltaĝiev. Nova kurso malfermota.

— **Vraca**. La 23-an de novembro j. k. laŭ invito de la loka Popola Universitato paroladis s-ro D-ro Zah. Zahariev de Sofio je temo „La moderna vivo kaj la bezono de internacia lingvo“. Kurso malfermita.

— **Petriĉ**. Estraro de la loka societo „Esperanto Triumfonta“: prezidanto—Koĉo Lipoŝliev, sekr.-kasisto — Georgi Andreev, bibliotekisto — Miltiadi Filipov.

La „Verda Semajno“ komencis la 30. X. j. k. Samtage malfermita ekspozicio en la klubejo de la loka Macedona Junulara Organizaĵo „Belasica“. Kurson gvidas s-ano M. Filipov.

— **Stanimaka**. Nova estraro de la societo „Signo de l'espero“: prezidanto — Vasil K. Darvarov, vicprezidanto — f-ino Zora Kovaĉeva, sekr.-kasisto — David Sasonov, biblio-

tekisto — Sava B. Taĉev. Kurso malfermota.

— **Tatar Pazarĝik**. Estraro de la loka societo „Radio“: prezidanto Penko Stoev — bankdirektoro, vicprezidanto — Ivan Drenikov—advokato, sekretario — Ivan Konstantinov, kasisto — Bencion Danon kaj bibliotekisto — Todor G. Ĉurenski.

Kurson por komencantoj gvidas S-ro Iv. Drenikov. Novaj kursoj malfermotaj.

La 15-an de decembro aranĝita „Zamenhof'a mateno“ en la granda salono de la urba legejo „Videlina“. Paroladis s-ro Penko Stoev — prezidanto de „Radio“.

— **Dupnica**. Estraro de la loka societo „Suno“: prezidanto — Serafim Vitanov, sekretario — Kosta Slavov kaj kasisto — Stefan Konjarov.

En la propra klubejo de la societo gvidataj kursoj — por komencantoj de s-ro S. Vitanov kaj por progresintoj de s-ro Kosta Georgiev. Novaj kursoj malfermotaj.

Aranĝita amuzvespero, bone vizitita.

— **Raĥovo**. Je la 14. XII. j. k. la loka societo aranĝis amuzvesperon, kies enspezo estas por la fondo „Arbarumo de la danuba insulo „Esperanto“.

v. **Hajredin (Oreĥov'a)**. La nova estraro de la societo konsistas el: prezidanto — C. T. Cenovski, sekr.-kasisto — Nik. Kocev, bibliotekisto — Iv. Nistorov.

Je la 4-a de nov. j. k. ekfunkciis kurso gvidata de s-ro Nik. Kocev — progimnazia instruisto.

La 27-an de la sama monato aranĝita dancvespero, bone vizitita.

v. **Ĝuljunica (G. Oreĥov'a)**. Kurson gvidas s-ro Georgi Savov, laŭ rekta metodo, helpe de radioaparato per kiu oni aŭdas esp. pa-



roladojn de Vieno.

— v. R. Konare (Plovdiv'a). La loka legejo „Prosveta“ malfermis esp. kurson, kiun gvidas s-ro St. Trifonov — instruisto.

v. Ravda (Anĥial'a). Kurson gvidas s-ro Ivan Momĉilov — instsuisto.

## Averto

La nuna CK de BEA estas devigata sciigi al la enlanda esperantistaro, ke la pasintjara CK ne bonvolis ĝis la lasta momento transdoni la plej gravan parton de la asociaĵoj, nome: 1) kaslibro de la 1929-30 j.; 2) libro de la debitoroj kaj kreditoroj de la sama jaro; 3) la varoj; 4) la materialoj de la migranta ekspozicio kaj 5) la aprobita statuto de BEA.

Ĉar sen la cititaj asociaĵoj la agado de la nuna CK estas forte embarasata, ni avertas la pasintjaran CK-on transdoni ĉion en plej baldaŭa tempo. En kontraŭa okazo, ni demetas de ni ĉian respondecon.

Sofia, 17. XII 1930 De la CK de BEA

## Eksterlanda kroniko

### TRA LA MONDO POR ESPERANTO

S-ro Joseph R. Scherer, speciala delegito de la ICK de la Esperantomovado, entreprenis propagandan mondvojaĝon. Li ekiris de Los Angeles (Kalifornio — U. S. A.) kaj en la momento, kiam ni skribas tiujn notojn, li estas jam forlasinta Japanujon, post sukcesa propagandlaboro en la lasta. (Detaloj troveblas en *Heroldo de Esperanto* kaj *La Revuo Orienta*).

Ĉar eble ankaŭ Bulgarujo estos haltpunkto dum la vojaĝado de s-ro

Scherer — probable venontprintempe — la societoj, kiuj volas inviti s-ro Scherer, kiel paroladonton, turnu sin pri detaloj al s-ro Dimitr Ivanov (str. Prista 28 — Ruse), kiu aranĝos la vojaĝon de s-ro Scherer tra Bulgarujo. Samtempe la societoj skribu al BEA!

## INTERNACIA ĈE-INSTITUTO

La fama aplikanto de la rekta instrumentado en Esperanto kaj bona propagandanto pastro Andreo Ĉe, helpita de ges-roj Isbruecker kaj aliaj nederlandaj samideanoj fondis, kiel privatan entreprenon, „Internacia Ĉe-Instituto“-n en Hago. La celo de tiu instituto estas prepari taŭgajn kursgvidantojn, kiuj aplikados la Ĉe-metodon.

Al „Internacia Ĉe-Instituto“ niajn bondezirojn pri daŭra kaj fruktodona ekzistado por bela estonto de Esperanto!

Ĉu vi pagis vian membro-kotizon al via societo?

Ĉu vi abonis al „Bulgara Esperantisto“ kaj „Balkana Konkordo“?

Se ne —

— vi ne plenumis gravan parton de via esperantista devo!

— —

Se via societo ankoraŭ ne aliĝis al Bulgara Esperantista Asocio — instigu la aliĝon en plej baldaŭa tempo!

ABONU AL:

### Literatura Mondo

monata literatura kaj arta revuo. Jarabono 220 levoj, duonjara 135, kvaronjara 75. Opa numero 25.

Abonejo por Bulgarujo:

Centra Librejo „Esperanto“  
Bulv. Maria Luiza 38, Sofia



BULGARA ESPER. ASOCIO  
CENTRA KOMITATO

№ 22

la 16-an de decembro 1930

Sofia

**Cirkulero**

*Al la esperantistaj organiza-  
zaĵoj en Bulgarujo.*

Karaj gesamideanoj,

Multa tempo forpasis de kiam ni akceptis la gvidadon de la Asocio, tamen ne multon ni povis fari. La kaŭzoj estas eksteraj kaj internaj — ĉefe la unuaj: la CK estis en krizo — unue sekretario-kasisto estis s-ano D-ro Zah. Zahariev, sed li renkontis malhelpon de la pasintjara CK, kiu ne transdonis la inventarion al li kaj post kelkfoja invito oni transdonis nur parton de ĝi. Tia restas la stato ĝis nun (legu la „Averto“-n). En tiu situacio s-ano Zahariev, anstataŭ agi akcele por Esperanto, devis perdi valoran tempon pro bagateloj kaj tial li ekŝiĝis — tio ĉi estis almenaŭ la ĉefa kaŭzo. Poste estiĝis sekretario s-ano Teodor K. Popoff, sed, ankaŭ li, vidante la haoson kaj ne trovante tempon forigi ĝin, ekŝiĝis. Nun sekretario-kasisto — tria — estas s-ano L. Marikin, eble ankaŭ li provizore, ĉar la situacio ankoraŭ ne pliboniĝis, malgraŭ nia deziro kaj penado.

Spite ĉion-ĉi la CK ne ĉesis labori — ĝi regule kunsidas ĉiumerkrede kaj aranĝas ĉiujn aktualaĵojn kaj ĝeneralajn aferojn, ekz. pri la Bulg. Esperanto-Instituto (BEI), pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn ktp. Do, ne estas pravaj iuj societoj kiuj riproĉas nin je neaktiveco, des pli ĉar ĝis nun ili nek aliĝis nek alimaniere helpis nin. Ili atendas ke unue ni agu, sed ĉu ili forĝis ke ni nenion heredis de la pasinteco krom ŝuldoj.

Urĝa tempo jam estas ke la societoj kolektu la membrokoti-  
zojn kaj sendu al ni nian parton, ĉar sen mono ni estas kateni-  
taj kaj nenion gravan ni povas entrepreni.

Priatentu ankaŭ la unuan cirkuleron (en № 3 de „BE“) precipe la demandilon. La sekretarioj bone notu ke estonte ili devas *regule* rilati al la Centro.

Multaj belaj planoj kaj gravaj inicjoj atendas sian realiĝon. Ĉu ili restu surpaperaj projektoj? Nel — pro la honoro de la sinceraj esperanto-pioniroj en nia lando, ni esperas ilian (de la projektoj) etektivigi. Sed por tio ni atendas vian ĝustatempan moralan kaj materialan helpon.

Prezidanto:  
G. AKTARGIEV

Sekretario:  
L. P. MARIKIN



## Sciigoj

— La CK de BEA kunsidas ĉiunmerkrede post la 19<sup>1/2</sup> h. en la kancelario de la Vegetara Koopera Societo — str. 6 septemvri № 3.

— **Korekto.** En la № 3 de „Bulgara Esperantisto“ estas allasita grava preseraro: El CK de BEA eksigis ne s-ro Boris Veliĉkov — kiel presite — sed s-ro Boris Vasilev, kies lokon en la CK okupis s-no L. P. Marikin.

Bonvolu noti la korekton kaj senkulpigu!

— Ĉiuj en- kaj eksterlandaj esp. organizaĵoj, redakcioj de gazetoj kaj apartaj gesamideanoj estas petataj noti bone la adreson de BEA:

postkesto 233 — Sofia

Neniam oni adresu al apartaj CK-anoj de BEA. Pri diversaj demandoj oni skribu sur apartaj folioj laŭdestine adresitaj (ĉu al CK de BEA aŭ al BEI, ĉu al Bulgara Esperantisto aŭ al Balkana Konkordo), ĉar la laboron de la diversaj fakoj prizorgas apartaj personoj.

— La samideanoj, en kies urbo aŭ vilaĝo ne ekzistas esp. organizaĵoj, povas rekte aliĝi al BEA pagante 50 levojn jare. La sumon oni sendu je unu fojo per postmandato. Ĉiu aliĝinto ricevos membrokarton.

Adreso: Bulgara Esperantista Asocio, poŝtenska kutija 233 — Sofia.

— Pri Bulgara Esperantisto. Dankon al la sekvantaj samideanoj pri ilia energia varbado de abonantoj al „BE“:

1. Bencion Danon — T. Pazarĝik — 35 ab.

2. Stefan Aleksiev — Jambol — 20 ab.

Kiu(j) ilin imitos? Ni bezonas ankoraŭ 300 abonantojn. Se oni donos al

ni tiun modestan ciferon, ni kuraĝas esperi pri pliampleksigo de Bulgara Esperantisto. De vi, samideanoj, dependas tio. Al laboro — kolektadu abonantojn! Profitu la alvenantajn festojn!

— En la lasta momento, ni ricevis sciigon de la societo en Petriĉ, ke oni sendos baldaŭ al ni 40 abonantojn. Kiu konkuros al Petriĉ? Ĉiuj societoj partoprenu la konkuradon pri plej granda nombro da abonantoj al „Bulgara Esperantisto“!

— Mendu certan kvanton da ekzempleroj por ponumera disvendado. Skribu al la administracio de „BE“!

— Monoferoj por la fondo „Bulgara Esperantisto“ estas danke akceptataj. En la venonta numero ni kvitancos pri ili.

— Pri „Balkana Konkordo“. № 1 jam aperis kaj estas sendita al ĉiuj abonantoj. La organizaĵoj kolektu laŭeble plej multe da abonantoj. Neniam forgesu, ke „Balkana Konkordo“ estas la unua paŝo por daŭra kunlaborado inter la balkanlandaj esperantistoj kaj — unua pruvo pri nia idea kaj praktika matureco!

Jarabono: 80 levoj. Adreso: „Balkana Konkordo“ — poŝtenska kutija 233 — Sofia.

---

### KORESPONDADO

— S-ro Georgi N. Peronkov, str. „Aleksandr“ № 80 — Lom (Bulg.) deziras korespondadi kun eksterlandaj gesamideanoj. Preferas abstinencajn temojn.

— S-ro Skren Pingogan — komercisto de galanteriaj varoj — str. „Ferdinand“ № 8 — Lom (Bulg.) deziras korespondadon kun en- kaj eksterlandaj gesamideanoj.



## Bibliografio

PER BALONO AL LA POLUSO de S. A. André, Nils Strindberg kaj Knut Fraenkel. Eldonis: Eldona Societo Esperanto — Stokholm 1 (Poŝtfako 698) — Svedlando. 416 pĝ. Prezo 9 sved. kr.

En 1897 jaro, tri kuraĝaj svedoj — André, Strindberg kaj Fraenkel — unuaj provis atingi la nordan poluson per balono. Ili forflugis al Nordo kaj . . . restis tie. „La granda mistiko de la polusa nokto kovris ilin. Kaj la nomo de André fariĝis mito, pri kiu oni ŝpinis multajn legendojn. Stranga estis la vivo — stranga la fino de lia vivo“. (E. Malmgren).

Kaj antaŭ kelkaj monatoj, norvega sciencekspedicio, hazarde trovis la mortotendejon de la pereintaj ekspediciuloj. Tio okazis sur Blanka Insulo en la Polusa maro. Per la tie trovitaj dokumentoj — taglibroj, not-almanako, observ'libroj, bildoj kaj kart'skizoj — oni povis detale priskribi ĉiujn stadiojn de la fatala ekspedicio. Vera tragedio!

La libro aperas samtempe en 12 lingvoj. La esperantan tradukon faris la verkisto Stellan Engholm, aŭtoro de la novelo „Al Torento“.

Belega — laŭ enhavo kaj teknika aranĝo — libro, kiu riĉigas la literaturan trezorejon de nia lingvo. Grava pruvo ke Esperanto ne nur vivas, sed ankaŭ ke ĝi staras samvice al la plej grandaj naciaj lingvoj.

Ni varme rekomendas la libron al nia legantaro!

ESPERDONA ISLANDO, de Jak. de Vreese, S. J., esperantigita de Fratulo Floriano. 12 x 18 cm., 40 pĝ., 11 ilustraĵoj. Prezo afrankite: fr. fr. 5.—Havebla ĉe Espero Katolika, 22, Cours Albert-Premier, Paris VIII.

### ESPERANTAJ GAZETAJ:

Esperanto — Genevo — Svisujo, XXVI jaro, №№ 10, 11, 12;

Heroldo de Esperanto — Koeln — Germanujo, 1930, №№ 45, 46, 47, 48, 49, 50, 51, 52;

Internacia Pedagogia Revuo — Dresden — Germanujo, IX jaro, №№ 8, 9, 10, 11—12;

Internacia Medicina Revuo — Bruxelles — Belgujo, VIII jaro, №№ 5, 6, 7;

Espero Katolika — Paris — Francujo, XXVII jaro, №№ 86, 87, 88, 89, 90;

Lingvo Internacia — Athènes — Grekujo, II jaro, № 8;

La Revuo Orienta — Tokio — Japanujo, XI jaro, №№ 9, 10, 11, 12;

Verda mondo — Kameoka — Japanujo, VI jaro, №№ 10, 11;

Oomoto — Kameoka — Japanujo, VI jaro, №№ 9, 10;

Oomoto Internacia — Paris — Francujo, V jaro, №№ 45, 46, 47, 48;

La Verda Lumo — Shanghai — Hinujo, VII vol., №№ 5, 6, 7, 8;

La Socialisto — Wien — Aŭstrujo, V jaro, №№ 8, 9, 10, 11, 12;

Esperanto Svenska Tidningen — Stockholm — Svedujo, 1930, №№ 11, 12;

Bulteno de CK de SEU — Moskvo — USSR, 1930, № 8—9;

Esperanto Radio-Programo — Luebbek — Germanujo, III jaro, №№ 28, 29, 30;

Schola e Vita — Milano — Italujo, V jaro, №№ 6—7, 8—9;

Hungara Heroldo — Budapest — Hungarujo, III jaro, №№ 6, 7;

Brazila Esperantisto — Rio de Janeiro — Brazilo — XXI jaro, № 7—8;

La Dordrehta Esperantisto —



Dordreĥto Nederlando, II jaro, № 22;  
Svisa espero — Bern — Svisujo,  
— II jaro, № 1;

Skolta Heroldo — Paris, Francujo  
— IV jaro, № 45;

Ondo de Daugava — Riga —  
Estonujo, VI jaro, № 12.

Amerika Esperantisto — Fort  
Lee — U. S. A. — 1930, № 2.

La Juna Batalanto — Koeln—  
Delbrueck (Germ.), V jaro, № 3—4;

Aŭstria Esperantisto — Kornen-  
burg ĉe Wien — Austrujo, VII jaro,  
№ 10;

La Komerco — Dresden/Rade-  
beul — Germ., 1930, № 13;

La Interligilo de l' P. T. T. —  
Paris—Francujo, VIII jaro, № 99.

Internacia Stenografisto — Ni-  
rove — Belgujo, IX jaro, № 34.

(Daŭrigota).

## BULGARLINGVAJ GAZETOJ KAJ JURNALOJ:

Uĉitelski vestnik — Sofia, Sozna-  
nie — Sofia, Vegetarianski pregled  
— Sofia, Dobro Zdrave — Kjusten-  
dil, Ardenska дума — Kirĝali,  
Zemja — St. Zagora, Trakiec —  
Jambol, Luĉa — T. Pazarĝik, Posled-  
ni Rusenski Novini — Ruse, Dunav-  
ska Tribuna — Ruse, Otec Paisij  
— Sofia, Bratstvo — Sevlievo.

(Daŭrigota)

La nuna numero de „Bulgara Es-  
perantisto“ laŭamplekse kaj laŭnu-  
mere estas triobla.

Ĝi ne povis aperi meze de decem-  
bro, kiel promesite, ĉar la presejo,  
kie ĝi estis presata, estis troŝarĝita  
per laboro.

## Atentu!

## Esperantistoj!

Esperanto estas lernebla  
nur dum du monatoj

**Jam aperis la nova lernolibro**

# ESPERANTO mallonga kurso

DE DIM. BORISOV

PREZO 20 LEVOJ

Prilaborita kaj alplenigita verkaĵo de Dim. Ivanov kaj Iv. Kovaĉev  
laŭ praktika metodo en 15 lecionoj kun 40 bildklarigaj tekstoj,  
kun moto antaŭparolo de l' fama matematikisto kaj lingvisto s-ro  
G. V. Ĉarkovski. La plej taŭga lernilo por aŭtodidaktoj kaj kursoj  
pro la bone analizitaj ekzercoj, reguloj klarigataj bilde kaj plaĉindaj  
facilaj legaĵoj. Rekomendinda lernilo por elementaj kursoj. Paĝoj 72.

Malkaraj insignoj  
18 diversspecaj  
Katalogon postulu senpage

Mendebla ĉe la eldonisto:  
DIMITR IVANOV  
Ruse, 28 Prista

Presejo „POSREDNIK“ — Sofia



## Bulgara Esperantista Asocio

### liveras:

la sekvantajn  
lernolibrojn, lernilojn kaj esperantaĵojn:

1. Lernolibro de Esperanto — de D-ro Zah. Zahariev, levoj 50
2. Esperanta sintakso por bulgaroj — de D-ro Zah.  
Zahariev „ 22
3. Praktika gramatiko . . . . . „ 3
4. Konversaciaro . . . . . „ 5
5. Anekdotaro . . . . . „ 10
6. Esperanto konkeros la mondon — de D-ro D. Gavrijski  
— bulgarlingva „ 12
7. Ĉu estas ebla kaj necesa internacia lingvo — de  
Prof. D-ro Iv. D. Ŝiŝmanov „ 4
8. Kongresparoladoj de Zamenhof — ĉiu po . . . . . „ 2
9. Portreto de Zamenhof . . . . . „ 10
10. Himno de Esperanto — sur poŝtkarto . . . . . „ 2
11. Ŝercoj kaj incitoj . . . . . „ 50

Por mendoj pli ol 100 lv. ni rabatas 20%. Ĉe malgrandaj:  
ĝis 100 levoj oni aldonu 10% por afranko kaj sendkostoj.

Ĉiam nur antaŭpage!

Sumojn sendu per poŝtmandate al  
BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO  
Poŝtenska kutija 233 — Sofia.